- B. En Svedio, komence en la sudaj provincoj pro ekonomiaj kialoj, oni povas aranĝi somerajn kultursemajnojn, kun gastprelegistoj/-aktoroj. Kulturo ne temas nur pri ĥorkanto, muziko kaj danco. Ankaŭ pri manĝaĵo, saŭno kaj vodko. Ekologiaj interŝanĝoj, turismaj aranĝoj, miniregatoj, homrajtaj seminarioj kaj multe pli povas esti.
- C. Renkontiĝoj de fakuloj de instruado, turismo, vegetarismo, ekologio k.t.p. estu favorataj.
- D. Ĉiujare en ĉebaltmara renkontiĝo la komitato disdonu distingajojn al personoj aŭ kluboj kiuj dum la jaro rimarkinde laboris por la celo de internacia fratiĝo. (Esperantistoj aŭ ne).

3

- A. Ĉerpante el nia estonta komuna informreto ni ofertu al la naciaj medioj periodajn tradukojn de ĝenerala intereso.
- B. La esperanto-kongresoj kaj komisionoj instigu al la medioj – televido, radio, gazetaro – pli ofte kaj profunde pritrakti temojn de la baltmara regiono.

4

Urĝa tasko estas instigi je aktualaj oficialaj prezentadoj de la landoj en esperanto fare de naciaj aŭtoritatoj, kulturaj, turismaj, edukaj k.t.p. La lasta "Faktoj pri Svedio" de la Sveda Instituto eldoniĝis en 1987(!)

Nenio enkatenigu la homon! Faru de la Baltmara regiono elstaran ekzemplon de interpopola kunlaboro en paco kaj progreso!

Wim Posthuma

Esperanto-Gården inaŭgurita!!!

La estraro kunsidis en julio kaj okaze de la konkludo de burokrataj malfacilaĵoj okazigis la solenan inaŭguron de Esperanto-Gården. Sen esti solene inaŭgurita Esperanto-Gården tamen dum 1998 estis loko por multaj aranĝoj i.a.:

- SLEA-jarkunsido en marto kun 30-o da ĉeestantoj.
- Somera kurso (2-semajna) en junio kun pli ol 40 partoprenantoj dividitaj en kvar grupoj.
- KEF en aŭgusto kun 182 partoprenantoj.

La tutan jaron venadis migranturistoj por tranoktado. Multaj esperantistoj restadis kaj plezure laboris por plibonigi sian propran domon.

Per niaj komunaj fortoj Esperanto-Gården prosperas! Koran dankon!

Anita Bergh/Kaisa Hansen



Dek tagojn antaŭ KEF alvenis volontuloj de la organizaĵo Internaciaj Laborbrigadoj al la Esperanto-Kurso en Lejsjöfors. Estis dek tri volontuloj, kiuj venis por helpi en la praktikaj laboroj dum KEF.

Ilia komuna lingvo estis la angla, sed ili antaŭvidis lecionojn en esperanto. La ideo estis, ke ili servu la partoprenantojn de KEF kaj povu respondi esperante, sed ankaŭ, ke ili partoprenu en la programoj de KEF, kio ankaŭ okazis. Jen kelkaj el ili sur la foto.

Balta Esperanto-Tendaro en Litovio

La Esperanto-semajno okazis 18 – 24/7 1998 en Veisiejai en Litovio. Jam dekan fojon Litovio gastigis BETon. Post 34 jaroj BET denove okazis en Veisiejai, en la urbeto, kie en 1885 kvar monatojn loĝis la aŭtoro de Esperanto. La dometo forbrulis dum incendio en la jaro 1924. Dum la semajno ni ekskursis al la strato de Zamenhof. Troviĝas memorŝtono sur la loko de la antaŭa dometo.

Veisiejai estas urbeto kun 2 200 homoj. Pli ol 1 km de la centro situas Agrikultura Lernejo de Veisiejai. La lernejo estis fondita en 1960 kiel agrikultura "teknikumo". En la lernejo ni havis ĉiujn kunvenojn. Laŭ nivelo ni partoprenis komencajn, paroligan aŭ perfektigan esperantan kurson.

Sekvis somera universitato en la granda salono. Prelegis Maria Timermane pri virina agado en Latvio. Ieva Svarčaitė prelegis pri "Erozio – tutmonda problemo sur litova tero". Ŝi ilustris la prelegon per lumbildoj. Dimanĉe estis katolika meso en la granda salono, kiu iĝis tute okupita. Du pastroj gvidis ĝin en bona Esperanto. Marde okazis ekumena diservo, kiun gvidis Erikas Laiconas.

Ĵaŭde okazis du duontagaj ekskur-

soj. Mi partoprenis la veturadon al Druskininkai. Ĝi estas bela turista urbo kun multe da vidindaĵoj. La gvidanto longe parolis kaj ĉio estis tradukita en Esperanton. Ni povis aĉeti bildkartojn kaj poŝtmarkojn, eĉ ŝanĝi monon. Neniu konis fremdajn lingvojn kiel la angla aŭ germana, nur la litovan kaj la rusan.

Ĝenerale la tagoj finiĝis per koncerto. Merkrede la 22-an de julio ni havis renkontiĝon kun urba publiko kaj komuna koncerto de esperantistoj en la urba parko de Veisiejai. Sed pli frue dum la tago estis solena inaŭguro de monumento al Ludoviko Zamenhof.


Sur la piedestalo ni legas la vortojn de Zamenhof diritajn en 1907 en Londono: "Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun mi neniam alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro".

En la inaŭguro partoprenis oficialaj reprezentantoj de distrikta kaj loka administracio, du parlamentanoj kaj ankaŭ multaj loĝantoj de Veisiejai. La inaŭguron honoris nepo de la aŭtoro de Esperanto L. Zaleski-Zamenhof veninta el Parizo. Lia parolado nun sekvas:

"Kun varma, kortuŝa amsento mi revenas hodiaŭ, dank' al via afabla invito, al Veisiejai por ĉeesti kun vi la inaŭguron de la impona monumento, kiun vi starigis por honoro la memoron de Doktoro Zamenhof.

La ĉarma urbeto de Veisiejai estas ja mejloŝtono sur la vojo de la vivo de mia Avo. Ĉi tie Li startis, kiel juna kuracisto, sian profesion karieron; ĉi tie li finrafinis verkon de sia vivo: la Lingvon Internacian. La vejsejanoj de Lia epoko rakontadis al siaj infanoj, ke preskaŭ neniam ili povis observi estingon de lumo en la fenestro de 'La doktoro': dumtage Li sindoneme helpis homojn venki malsanon de ilia korpo; dumnokte Li pacience ellabo-

Nova monumento pri Zamenhof estis inaŭgurita dum BET.



Ĉu vi konas Veisiejai?

Veisiejai estas malgranda urbeto inter lagoj kaj densaj arbaroj en la sudokcidenta parto de Litovio. Tie merkrede la 22-an de julio 1998 okazis grava evento en la Esperanta movado. Busto de L. L. Zamenhof, la kreinto de la Internacia Lingvo, estis inaŭgurita de L. Zaleski-Zamenhof, nepo de la aŭtoro de Esperanto.

Kial tiu ĉi solenaĵo? Ĉar Veisiejai estas ligita kun la komenco de Esperanto. En januaro 1885 L. Zamenhof finis siajn studojn en Varsovio kaj ricevis diplomon de kuracisto. Tiutempe lia fratino Fania, kiu loĝis en Veisiejai kaj estis edzino de loka apotekisto, petis urĝan helpon de sia frato, ĉar ŝia edzo grave malsaniĝis. Do en februaro 1885 Ludoviko veturis al Veisiejai. Ĉar en tiu urbeto ne estis kuracisto, Zamenhof decidis ĉi tie komenci kuracistan praktikon.

Lia klientaro ne estis abunda, fakte kiu verŝajne donis al li sufiĉe da tempo por reverki la manuskripton de la Internacia Lingvo, kiun lia patro estis forbruliginta. Laŭ lia dommastrino li konsumadis amason da vaksandeloj. Do ni povas supozi, ke ĉi tie en Veisiejai estis verkata la unua libro

de Esperanto.

Sed Zamenhof ne restis longe, nek en Veisiejai nek kiel ordinara kuracisto. Mi citas lin mem: "Praktikinte tie en la daŭro de kvar monatoj, mi konvinkigis, ke por la komuna medicina praktiko mi tute ne taŭgos, ĉar mi estas tro impresiĝema kaj la suferoj de la malsanuloj (precipe de mortantoj) tro multe min turmentis. Tiam mi revenis Varsoviajn kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn de okuloj."

En Veisiejai okazis 18-24/7 1998 la 34-aj Baltaj Esperanto-Tagoj kun 253 partoprenantoj el 14 landoj, precipe el Litovio kaj Pollando. El Svedio venis du el Helsingborg kaj unu el Jönköping. Ni partoprenis paroligan kaj perfektigan kurson, aŭskultis prelegojn kaj koncertojn, promenis en la arbaro kaj ripozis ĉe la lago, babilis kun diverslandaj samideanoj kaj ĝuis la Esperantan etoson. Por ni el Helsingborg tiu ĉi tendaro estas la unua plurtaga Esperanto-aranĝo kiun ni partoprenis, kaj ĝi donis al ni emon daŭre viziti aranĝojn en diversaj landoj.

Ann-Louise Åkerlund

ris la rimedon kontraŭ la malsano de ilia animo: kontraŭ malamo inter homoj diversnaciaj, homoj diverskulturaj, homoj diverslingvaj; malamo kaŭzata de la reciproka malkompreno...

Multaj personoj tra la mondo, multaj grupoj ŝatas diskuti pri la origino de mia Avo. Oni kutimas en la enciklopedioj difini Doktoron Zamenhof kiel 'polan kuraciston'; aliloke oni trovas lian difinon kiel de 'ruslanda hebreo'; tamen mi trovis ankaŭ tekston, verkitan okaze de lia centjara jubileo, kie profesoro Waringhien, konata franca esperantologo, skribas: '... Litovujon li sentis kiel sian patrujon, ... ĉar li pasigis siajn plej feliĉajn feriojn en Veisiejai ...' Kaj ni ne forgesu, ke al tiu feliĉo ja kontribuis juna fraŭlino el Kaunas, tiam fianĉino, poste edzino kaj patrino de Liaj infanoj, litovino, daŭre amata de Li dum tuta vivo...

Fakte, maskiĝinte en, tiam ruslanda, Bjalistoko, Ludoviko Zamenhof, ankoraŭ kiel juna knabo, translokiĝis kun la familio al Varsovio; Li poste studadis en Moskvo, en Varsovio kaj en Vieno; sekve li profesis en Litovujo, en Belorusio, en Ukrainio kaj fine en Pollando, tiam sub la rusa kaj poste sub la germana regado. Kaj estis la francoj, kiuj nomis Doktoron Zamenhof Kavaliro de la Honora Legio, same kiel la hispanoj, kiuj honoris Lin per la medalo de Isabella la Católica. Fine tamen estis Svislando, kiun li elektis por la edukado de siaj infanoj ... Kiel ĝuste skribis siatempe profesoro Lapenna: '... Zamenhof ... leviĝis super sia popolo kaj fariĝis loĝanto de la mondo, apartenanto al la homaro...'

Sekve, Doktoro Zamenhof, laŭ Siaj propraj vortoj esprimitaj jam en la jaro 1905, dum la unua Kongresparolado en Bulonjo sur Maro, apartenas al ni ĉiuj: '... membroj de ... malsamaj popoloj, starantaj unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke ... kaj premas al si reciproke la manojn ... sincere, kiel homo al homo...' Tial en la solena momento de inaŭguro de tiu monumento omaĝe al mia glora Avo, en la loko de Lia feliĉa juneco, mi citu la 'Saluton al Zamenhof' verkita de Lia fidela svisa amiko, tiam ankaŭ tre juna Edmond Privat:

*Al ĉiuj popoloj benatan donacon
Vi faris trafante la vojon plej bonan:
En korojn de l' homoj eksemis vi pacon
Sur lipojn semante la lingvon belsonan*

Mi ŝatus aldoni, ke tiu 'benata donaco', tiu neŭtrala 'lingvo belsona' celas servi la protektadon de medio kultura, la protektadon de lingvoj naciaj – vehikloj de kultura diverseco; kontribuante tiamaniere al la longdaŭro de kultura riĉeco de la homaro. Same kiel protektado de medio natura kontribuas al la longdaŭro de vivo sur nia terĝlobo. Mi deziras

omaĝe menci la tiurilatan sindoneman agadon de Doktoro Valdas Adamkus, la meritplena Prezidento de Litova Respubliko, varma subtenanto ankaŭ de la hodiaŭa evento."

En BET-34 partoprenis esperantistoj el 14 landoj, entute 253 homoj

(162 virinoj kaj 91 viroj). El Litovio 157, Pollando 56, Finnlando 13, Latvio 9, Estonio 5. El Svedio ĉeestis 3, kaj mi estis unu el tiuj.

Arne Lundkvist

Ansök om bidrag

Vid sidan av esperanto finns många andra planspråk, som har haft betydligt färre anhängare än esperanto. Det mest kända kallas ido. "Ido" betyder ju avkomling och är just en avkomling till esperanto, alltså en något förändrad version av esperanto.

Ido fick aldrig särskilt många anhängare, och Svenska Ido-förbundet upplöstes slutligt 1996. Vid upplösningen överfördes förbundets tillgångar till den nybildade Ido-stiftelsen för språkforskning till Hellmut Rönisch minne. Stiftelsen skall främja "undervisning, utbildning och forsk-

ning som behandlar världsspråk och andra medel för att överbrygga barriärer mellan människor och nationer." Stiftelsens kapital är ca 4 miljoner kronor, vilket innebär att för närvarande ca etthundra tusen kronor kan delas ut årligen.

En medlem i det tidigare Svenska Ido-förbundet har tipsat mig om att esperanto-rörelsen självfallet kan ansöka om bidrag från stiftelsen. Ändamålet är alltså mycket passande för mycket av den verksamhet som bedrivs inom esperanto-rörelsen. Adressen för ansökningar är:

**SE-banken,
Bankjurist A-C Sandell,
Juridik ST S3,
106 40 Stockholm**

Leif Nordenstorm

Radio på esperanto

Internationellt (Svenska tider. Svenska tiden för utsändningar från Kina, Österrike, Kuba och Italien ändras 25/10 1998):

Kl.	Dagar	Station	Frekvenser (kHz)	Riktning
0.00-0.30	måndag	R. Havano Kubo	13715	Europa
0.30-0.57	alla	Ĉina R. Int.	6860;6950	Latinamerika, Europa
1.05-1.30	måndag	R. Aŭstria Int.	9870	Sydamerika
1.30-2.00	måndag	R. Havano Kubo	6070;11760	Amerika, Karibien
6.05-6.30	söndag	R. Aŭstria Int.	6155;13730	Europa
9.00-9.30	söndag	R. Havano Kubo	9820	Asien, Nordamerika
13.00-13.27	alla	Ĉina R. Int.	7170;9535	Ostasien
15.00-15.27	alla	Ĉina R. Int.	11600;11840	Sydostasien
15.30-16.00	alla	Pola R. Varsovio	7285;7305	Europa
16.05-16.30	söndag	R. Aŭstria Int.	6155;13730	Europa, Västafrika
17.00-17.30	söndag	R. Havano Kubo	11760	Amerika, Karibien
20.00-20.30	alla	Pola R. Varsovio	6095;7205	Europa
21.20-21.30	söndag	R. Vatikana	527;1530;4005;5882	Europa
21.20-21.35	onsdag	R. Vatikana	1611;6185	Europa
21.30-22.00	söndag	R. Havano Kubo	13715	Europa
22.00-22.20	lördag	RAI Internacia	9655;11860	Europa
22.00-22.27	alla	Ĉina R. Int.	7405;9965	Europa
22.30-22.55	alla	Pola R. Varsovio	6035;6095;7270;7285	Europa

Svenskt:

Kl.	Dagar	Program	Frekvens (MHz)	Ort
17.30-18.00	tisdag	Radio Esperanto	89,2	Malmö
8.00-8.30	lördag	Radio Esperanto	89,2	Malmö
16.30-17.00	söndag	Världen i Aros	93,7	Västerås

Svenska språket hotat i EU-förslag

Första steget mot ett gemensamt EU-språk är taget. Det finns en uppenbar risk för att det svenska språket kommer att utarmas. Ett första steg i den riktningen håller på att tas vad gäller patentfrågor.

Den europeiska patentorganisationen, EPO, har sedan något år drivit frågan om att förändra reglerna för patentansökningar i Europa. Det föreslås att endast en mindre del av ett patent ska behöva översättas till det lands språk vari man ansöker om patent. I huvudsak ska det, enligt förslaget, räcka med att hela patentet översätts till engelska, tyska och franska.

Demokratifråga

Innebörden i förslaget skulle medföra omfattande inskränkningar i svenska språkets ställning inom EU. Det utgör samtidigt ett angrepp mot våra demokratiska principer. Svenska medborgare skulle mista sin rätt att, i juridiska tvister, kunna skydda sina intressen och sin egendom på det inhemska språket.

Kulturell fråga

Det svenska språket är en mycket central del av vår kultur. I medlemskapsförhandlingarna inför Sveriges inträde i EU var det ett viktigt krav att det svenska språket behandlades likvärdigt med andra länders språk. Redan efter ett par år kan dock konstateras att svenskan diskrimineras, och den här första attacken mot svenska språket utgör ett tydligt tecken på att det finns krafter som även vill "centralisera språket".

Svenska Akademiens ståndpunkt

Svenska Akademiens Ständige Sekreterare, Sture Allén, har i ett brev till Svenska Patentombudsforeningen uttryckt sin oro för konsekvenserna av Grönbokens förslag enligt följande: "att få vissa länder att avstå från kravet på översättning till det egna språket är bara ytterligare ett exempel på hur viktigt det är att språk som svenskan står sig i internationella sammanhang. Den här gången handlar det inte bara om språket som en del av vår nationella och kulturella identitet utan också om ett rättvisekrav ett påtvingat tolkningshandikapp av det slag som beskrivs i er skrivelse är helt oacceptabelt."

Inom svenska patentombudsforeningen anser vi att frågan är en av vår tids stora demokratiska och kulturella frågor och vänder oss därför till andra organisationer och instanser för att påtala denna utveckling och att agera för att förhindra en sådan utveckling.

Patentsystemet idag

Ett patent är ett skydd för en lösning på ett tekniskt problem. En uppfinning eller ny produkt är ofta resultatet av en omfattande forskning och tas fram för att tillfredsställa ett visst behov på marknaden. Ett bevil-

jat patent skyddar innehavaren under minst 20 års tid så att inte andra tar hela idén och därmed för-tjänsten av dessa utvecklingsinsatser. För att få ett patent beviljat måste handlingar som beskriver produkten eller idén granskas och godkännas av ett nationellt patentverk eller av det europeiska patentverket.

Patent innehåller en omfattande dokumentation. Patent utgör en värdefull kunskapskälla för uppfinnare, produktutvecklare och konstruktörer och ger teknisk information. Denna ger underlag till idéer och kunskap om utvecklingen i en bransch och om konkurrenters aktiviteter. En förutsättning för detta är att var och en kan förstå och tillgodogöra sig innehållet i patentbeskrivningen.

Det finns inga världspatent. En uppfinning måste skyddas i varje land för sig. Däremot finns konventioner för att underlätta patentering i olika länder. En sådan är den europapatentkonvention som administreras av EPO, European Patent Office och omfattar alla EU-länder samt Schweiz. Verksamheten regleras i EPC, European Patent Convention.

En patentsansökan består av tre delar:

1. Patentbeskrivning är en teknisk beskrivning, i många fall åtföljd av ritningar, där uppfinningen, bakomliggande teknik och nya lösningar presenteras.

2. Patentkrav anger det önskade skyddets omfattning uttryckt i koncis form.

3. Sammanfattning ger en kort översiktlig beskrivning av uppfinningen, huvudsakligen avsedd för klassificerings- och undersökningsändamål.

Översätts till respektive lands språk

Nationella patent behandlas alltid på respektive lands språk. För europapatent krävs i dagsläget att patentet (beskrivning och patentkrav) måste översättas till respektive lands språk. Enligt Europeiska patentkonventionen skall varje land bestämma om översättning. Just frågan om översättning vägde mycket tungt när konventionen utarbetades och ett viktigt motiv var jämlikhetsskäl. Alla, oberoende av vilket språk man talar, ska ha samma förutsättningar att lätt

tolka innebörden i och se hela räckvidden av ett patent. Alla ska ha samma rättigheter och förutsättningar att skydda sina patent och att kunna ta del av andras patent.

Nytt patentsystem på förslag

För att gå storföretag, främst utomeuropeiska till mötes föreslår den Europeiska patentmyndigheten förändrade regler:

1. Patentbeskrivningen i europeiska patent skall enligt förslaget endast behöva finnas på något av de tre officiella språken engelska, franska eller tyska. Översättning till det nationella språket skall endast behövas vid en eventuell domstolsprocess om patentet.

2. Patentkraven översätts till samtliga designerade länders nationella språk på samma sätt som idag.

3. Sammanfattning. Denna kompletteras med ett i det Europeiska patentverkets regi utarbetat och till alla språk översatt s.k. förbättrat sammandrag. Detta är främst avsett att underlätta klassificering och översiktliga undersökningar. Kostnaderna för detta sammandrag skall betalas av patentsökanden, som inte har något behov därav.

Primära konsekvenser

Krav på språkkunskaper. Den som vill sätta sig in i ett patent måste, om det Europeiska patentverkets förslag genomdrivs, ha mycket goda kunskaper i juridisk och teknisk franska, tyska och engelska samt behärska alla valörer och språkliga nyanser i respektive språk. Annars är risken stor för missförstånd och att väsentliga delar feltolkas. Följden kan lätt bli oavsiktliga patentintrång vilket leder till kostsamma rättsprocesser.

Svenska företag förlorar i konkurrenskraft gentemot amerikanska, engelska, tyska, franska, schweiziska, belgiska och österrikiska samt japanska som har något av de officiella språken eller använder engelska som koncernspråk. För dessa blir det mer eller mindre gratis att ta med Sverige på listan över länder där ett patent ska gälla. Samtidigt blir kostnaderna för svenska företags patentansökningar i de nämnda länderna fortsatt höga.

Svenska företag drabbas ensidigt.

Den senaste tidens utveckling visar att länder som Italien, Portugal, Spanien och Grekland med största sannolikhet kommer att avvisa EPO-kraven, dels av konstitutionella skäl och dels på grund av att språkkunskaperna i de officiella språken är sämre än i Sverige. Därför bör inte Sverige acceptera något som inte alla länder är med på.


Svenska patentombudsforeningen

Mer information från
Thorsten Onn
tel. 08-7299500 (0708-299500)
(ur <http://www.spof.com>)

Esperanto en mini-urbo

La Esperanto-Klubo de Munkeno en kunlaboro kun Esperanto-Junularo partoprenis la plej malnovan infanurbo-projekton en Germanio. Tiu infanurbo okazas en ĉiu dua jaro (dum la lastaj jaroj en la Olimpika Parko de Munkeno), kaj partoprenas ĝin kutime 16-20.000 infanoj. La infanoj en akompano de pedagogoj mastras la urbon. Ekzemple, la urbestro estas 16-jara knabino, kaj oni povas fariĝi burĝano de Mini-München post 4 horoj da laboro kaj kvar horoj da studado.

La nomo de la altlernejo de Mini-München estas Comenius-Universitato. Fritz Hilpert jam antaŭ 4 jaroj komencis oferti kadre de altlernejo Esperanto-lingvokursojn. Ĉijare la preparoj estis pli ampleksaj kaj pli frue kjomencitaj. La enigoj de la E-kursoj en la oficialan programon estis organizita jam meze de 1997, tiel sur ĉiuj afiŝoj en la tuta urbo aperas la nomo de la Esperanto-klubo kiel subtenanto.



KLUBO 1000

Torsten och
Gertrud Lund,
Malmö, 1000 kr

DONACOJ

Esperanto Väsby,
470 kr

MEMORE AL
ANNA-LISA LISS
Falun-Borlänge
Esperantoklubb,
200 kr

ESTONTAJ ARANĜOJ

Sveda Esperanto-Instituto

invitas al
Seminario "La Profesia Lingvo"
kaj
Kurso pri La Esperantohistorio
kaj -literaturo

La seminario okazos en Esperanto-Gården en Lesjöfors 26 - 27 sept. 1998, kaj la kurso 28 sept. - 2 okt. Ĉio en esperanto sen traduko.

Kunlaborantoj i.a.:

Vjaceslav Hromov, Estonio
Katalin Smidéliusz, Hungario
Ebbe Vilborg, Svedio
Kantos kaj kantigos nin per helpo de sia gurdo:
Roland von Malmborg

Ĉu vi volas plibonigi vian scion pri esperanto?

Partoprenu la 5-tagan kurson. Lerne pri la historio kaj la literaturo de esperanto kaj ekzercu vin lingve sub gvido de spertaj instruistoj. Estos lecionoj antaŭtagmeze, kaj aliaj pli distraj programeroj vespere. Detala programo estos ellaborita poste, petu informojn.

Kostoj:

Kotizo (kaj seminario kaj kurso ĝis 10 sept.) **225:-**
Kotizo (kaj seminario kaj kurso post 10 sept.) **275:-**
Unu tranoktado en du-litaj ĉambroj kaj ĉiuj manĝoj de 9.30 sabate ĝis 15.30 dimanĉe **400:-**

Du tranoktadoj en du-litaj ĉambroj kaj ĉiuj manĝoj de 18.00 vendrede ĝis 15.30 dimanĉe **600:-**
(En tri-kaj kvar-litaj ĉambroj 10:- malpli ponokte)
Kromaj restadkostoj dum la kurso potage **220:-**
Lit-kaj mantukojn **60:-**

Pri prezoj kaj eblecoj por unu-lita ĉambro, amasloĝejo kaj unuopaj manĝoj petu informojn.

La prezoj inkludas ankaŭ kostojn por konferencejoj, purigado post la seminario/kurso kaj kantfolioj.

Aliĝo

Pagu minimume la seminarian kotizon al p.ĝ. 51511-4 Sveda Esperanto-Instituto. Notu vian mendon sur la talonon, ankaŭ se vi deziras vegetaran aŭ alian specialan manĝon. Pagu la tutan sumon en bona tempo antaŭ la seminario, tio faciligos la administradon, same kiel frua aliĝo.

Pri librotablo, vojaĝeblecoj kaj pli da informoj:

Kontaktu skribe Märtha Andréasson, Friarelyckan 50, 425 43 Hisings Kärra aŭ telefone iun el la sube menciitaj personoj.

Ĉiuj estu kore bonvenaj!

Bo	031-918554
Bertil	0415-50152
Inga	031-155723
Lars	0586-54811
Märtha	031-571133

Kallelse till årsstämma i

Esperanto-Gården
i Lesjöfors ek.för.

Fredagen
den 25 september 1998
kl. 18.00

För bokning av rum
kontakta

Esperanto-Gården
Tel. 0590-30909
Fax 0590-30309

Voko al jarkunsido en

Esperanto-Gården
i Lesjöfors ek.för.

Vendrede
la 25-an de septembro 1998
je la 18.00 h

Por mendi ĉambrojn
kontakta

Esperanto-Gården
Tel. +46-590-30909
Fakso +46-590-30309

**Malmö Esperantoförening
Kronetorpsg 94
21227 Malmö**

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Tipsfrågor om esperanto

- (Rätt svar sidan 11)
- Vad är esperanto?
a) En religion b) Ett bilfabrikat c) Ett språk
 - Ungefär hur många uppslagsord innehåller Ordbok Svenska-Esperanto?
a) 500 b) 5.000 c) 50.000
 - När utgavs den första läroboken i esperanto?
a) 1492 b) 1889 c) 1946
 - Vad heter den internationella tidningstjänst på internet som skapats av en svensk esperantist?

- Var förekommer "språket" transpiranto?
a) Ankeborg b) Grönköping c) Saltkråkan
- Var ligger det vandrarhem som drivs av esperantorörelsen i Sverige?
a) Lesjöfors b) Ronneby c) Skellefteå
- Vilka verb har oregelbunden böjning i esperanto?
a) Inga b) De intransitiva c) De modala hjälpverben
- Vilken av följande böcker på esperanto har Henrik Ibsen som författare?
a) La oldulo kaj la maro b) La besto-farmo c) Puphejmo

- Vilken känd esperantist grundade i Malmö ett korrespondensinstitut för undervisning?
a) Björn Collinder b) Hans Hermod c) Paul Nylén
- Vem skapade esperanto?
a) Ludwig Zamenhof b) Ignaz Semmelweiss c) Heinrich Schliemann
- I vilket land ligger internationella esperantoförbundets huvudkontor?
a) Nederländerna b) Polen c) Schweiz
- I vilken stad finns en folkhögskola där man undervisat esperanto i tio år?
a) Karlshamn b) Karlskrona c) Karlskoga
- Vilken symbol för ljus och bildning finns i esperantos flagga?
a) En kedja b) En femuddig stjärna c) En gul cirkel

KRUCVORTA ENIGMO



Horizontale

- Ŝnuron sur velboato – Korinklin'
- Oratoroj
- Stari en vico – Longtempe
- Nomo de konata floso – Venos de
- Dokumento – Tre kara persono
- Estas rozoj – Antaŭ Anĝeleso
- Inklina – Nutraĵ'
- Lavujo – Tiel rapide!
- Amo
- Malplezuras

Vertikale

- Kolektade – Subjunkcio en kelo
- Tombejon
- Metale – Pasu al alia flanko
- Hartranĉon – Odina
- Maljune – Staras en vico
- Kiel infanoj – Post sepa
- Mank' de volo – En Elsa
- Neharmoniaj
- Unutonan
- Malneos – Pagil'

SOLVO DE 98/3

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	E	V	I	T	E		T	R	I	A
2	S	I	D	A	S		R	E	S	T
3	P	R	E	L	E	G	A	N	T	A
4	E	T	N	O	N		M	A	R	K
5	R	O	T		C	I	A		I	O
6	A	N	A	R	O	N		D	O	
7	N		J	E	S		S			K
8	T	A	N		G		N	I	A	L
9	O	R		A	R	D	A	N	T	A
10	N	O	R	N	O		N	E	A	S

Svar till tipsfrågorna

(Lyft tidningens sista sida mot ljuset)

	a	b	c
1			
2			
3			
4			
5			
6			
7			
8			
9			
10			
11			
12			
13			

Lennart Persson